§

# Jura Semajno

Semajna bulteno de Internacia Jurista Esperanto-Asocio

Majo : 1 2022

## BORIS BECKER KONDAMNITA AL DUJARA MALLIBERECO PRO FRAŬDA BANKROTO

Brita tribunalo ĵus kondamnis la eksan tenis-ludiston Boris Becker al dujara mallibereco, pro la delikto kaŝi liajn havaĵojn al kunveno de kreditoroj en la jaro 2017. Becker, eksa fama tenis-ludisto, loĝas en Britio de antaŭ kelkaj jaroj, tie li laboris kiel sporta komentariisto en la BBC-dissenda kompanio.



*Boris Becker estis la plej juna triumfanto en la prestiĝa tenis-turniro en Wimblendon en la jaro 1985.*

Kiam li ne povis pagi hipotekon de granda kaj luksa vilao en la insulo Majorko (Hispanio), liaj kreditoroj ekigis juran proceson. Unuamomente, kiam oni petis al li pagi liajn ŝuldojn, Boris Becker montris sin tute kunlaborema kun la kreditoroj, tamen, samtempe li trapasis al apuduloj la proprieton de kelkaj nemoveblaĵoj. Inter ili, domo en Germanio kie loĝas lia patrino, kies prezo estas 1,5 milionoj da eŭroj; kaj grandaj kvantoj da mono al eksa edzino. Pro tio, la prokuroro akuzis lin pro fraŭda bankroto.

Dum la jura proceso, S-ro Becker sciigis, ke dum sia sporta kariero li gajnis pli ol 40 milionojn da eŭroj, tamen preskaŭ ĉio *forvaporiĝis* post multekosta divorca proceso kaj pro *malŝparema* vivstilo.

Laŭ la brita leĝo, ŝuldanto estas devigata sciigi pri siaj havaĵoj kiam kreditoroj kunvenas por leĝe postuli ties pagon. Kiam tio okazis, Boris Becker ŝuldis 58 milionojn da eŭroj. Laŭ la juĝo de la brita tribunalo, S-ro Becker kaŝis sian monon kaj siajn propietaĵojn por eviti la pagon.

Ĝis nun la kreditoroj nur bonorde ricevis 3,7 milionojn. Preskaŭ unu milionon oni atingis post la vendo de la sportaj trofeoj de la germana tenis-ludisto.

## LA DELIKTO PRI FRAŬDA BANKROTO

Delikto pri fraŭda bankroto plenumiĝas kiam debitoro, volonte, kaŝas siajn havaĵojn por eviti la pagon de siaj ŝuldoj. Do, ne necese li okazigas realan kaj certan damaĝon al kreditoro, sufiĉas provi fari tion.

Eseistoj opinias, ke okaze de fraŭda bankroto devas okazi jeno:

- La ŝuldo devas ekzisti antaŭ la fraŭda bankroto.
- Ne gravas ĉu la kreditoro estas fizika aŭ jura persono.
- La celo de detruo aŭ kaŝo de la proprietaĵoj estas eviti la bonordan pagon de la kredito.
- La debitoro devas esti nesolventa, tio estas, li ne kapablas pagi siajn ŝuldojn.

Rilate la altrudotan punon, tiu afero malsimilas laŭ naciaj leĝaroj. Tiel:

- En Hispanio la kondmano estas malliberigo de 1 al 4 jaroj.
- En Argentino kaj en Kostariko: 2 al 6 jaroj.
- Gvatemalo: 2 al 10 jaroj.
- Turkio: 3 al 8 jaroj.
- Portugalo: ĝis 5 jaroj.
- Venezuelo: 8 al 10 jaroj.

## GRAVA INFORMO POR MEMBROJ AŬ SIMPATIANTOJ DE IJEA, KIUJ PROFESIE AGADAS KIEL ADVOKATOJ.

Dum la venonta Universala Kongreso de Montrealo, oni informos pri la baldaŭa fondiĝo de **UIAE -Unio Internacia de Advokatoj Esperantlingvaj-.** Temas pri nova asocio kie renkontiĝos ĉiuj advokatoj kiuj parolas aŭ simpatias la internacian lingvon.

Ne temas pri konkuranta asocio kun nia IJEA, pro la fakto ke IJEA rilatas al juristoj, el ĝenerala vidpunkto, ne nur al tiuj kiuj profesie agadas ĉe juĝaj instancoj kiel advokatoj. Kompreneble, ambaŭ asocioj kunlaboros kiel eble plej efike.

**Pliaj informoj pri UIAE ĉe uiaeesperanto@gmail.com**

# *Vorto de la Semajno*

**Arbitracio**: Decido pri ia grava diskutaĵo, farita de ekstera(j) persono(j), interkonsente elektita(j) de la diskutantoj.

**Arbitracii** (tr)**:** Meti finon al diskuto per arbitracio.

**Arbitracianto, Arbitraciisto:** Tiu, kiu arbitracias.

**Internacia arbitracio:** Mediacio farita kun la celo solvi malkonsenton inter du aŭ pliaj ŝtatoj.

Sinonimoj**:** *Mediacio, alproksimigo.*

*Por eviti socialan konflikton ofte estas necese efektivigi arbitracion inter registaro, sindikatoj kaj entreprenistaro.*

*La Sankta Seĝo agadis kiel arbitracianto okaze de la teritoria disputo inter Argentino kaj Ĉilio pro la suvereneco de la Kanalo Beagle.*

